# *Laborvizito de la prezidento kuba en havanaj municipoj*



**Foto@PresidenciaCuba**

Havano, apr 12 (RHK) Kiel parto de la prezidenta tagordo, la kuba ?tatestro  Miguel Díaz-Canel, taksis la ekonomian aktivecon en tri municipoj de ?i tiu ?efurbo ?i-vendrede, kiu inkluzivas travoja?ojn de la teritorioj kaj dialogoj kun la lo?antaro.

Akompanate de la membro de la Politika Buroo kaj sekretario pri Organizo de CCPCC Roberto Morales Ojeda kaj aliaj landaj kaj provincaj gvidantoj, la prezidento vizitis la municipojn Boyeros, Cerro, kaj Marianao, kie li anka? ekzamenis la progreson de pluraj sociaj programoj.

Dum sia restado en Boyeros, li turneis la Agrikulturan Esploran Instituton kaj parolis kun dungitoj de la Komandanto Camilo Cienfuegos Elektronika Kompanio.

En la Maljunulejo Antonio Maceo en Cerro, la prezidanto konstatis la prizorgojn donatajn al  maljunuloj kaj kiel ili okupas sian tempon en tiuj ?i centroj, kiuj estas parto de la sistemo por atenti maljunularon.

Fonto: PL

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/380704-laborvizito-de-la-prezidento-kuba-en-havanaj-municipoj

**Radio Habana Cuba**